



Boletín

n° 409 Enero - Marzo 2015



Boletín

Bulteno de Hispana Esperanto-Federacio
aperanta de 1949
Numero 409

Redakto-skipo
Direktado kaj kompostado: Ángel Arquillos L.

Revizio: Alejandro Pareja

Retadreso de la bulteno:
bulteno@esperanto.es

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la
respektivaj aŭtoroj

* La redakcio rajtas rifuzi nepetitajn artikolojn

*Republikado de enhavo nur permesita kun per-
meso de la redakcio aŭ de la aŭtoro

Hispana Esperanto-Federacio *Federación Española de Esperanto*

Rodríguez San Pedro, 13, 3º, 7
ES-28015 Madrid
admin@esperanto.es
Bankokonto BBVA: ES85 0182 1252 31
0204011961

Poŝtelefono: +34 638 547 104
Telefono: +34 914 468 079 (bv. lasi mesaĝon
en la aŭtomata respondilo)

Estraro

Prezidanto: José Antonio del Barrio
Vicprezidanto: Ángel Arquillos López
Sekretario: Félix M. Jiménez
Kasisto: Raúl Mtnéz. Anguita
Voĉdonantoj: Eduardo Berdor
Juan José Vera
Jesús García Cano

Presejo: Gráficas Notivol (Zaragoza)
DL: M-39811-2012

Salutvortoj

Karaj amikoj.

La unua jarnumero de nia *Boletín* estas tradicie la okazo por plenumi kelkajn necesajn burokrataĵojn, ĉar ĝi nepre enhavas la alvokon al nia Ĝenerala Kunveno, la bilancon, financon kaj aktivulan, de nia asocio dum 2014 kaj la planoj por 2015. Sed tiu tradicia devo ankaŭ ebligas al mi pripensi pri la marŝo de nia asocio, pri la atingoj kaj la celoj.

Por HEF mem, 2014 ne estis malbona jaro. Ĝi vidis la rimarkindan sukceson de nia Kongreso, laŭ nombro de partoprenintoj, kvalito de la programeroj kaj kontento de la ĉeestintoj. Ĝi markis gravan antaŭenigon de la instruista agado, per la rekreado de la instrua fako kaj la agnosko kiel oficiala sekcio de ILEI. Ĝi firmigis nian agadon en la reto, per nia retejo, nia *Bitoteko* kaj nia ĉeesto en sociaj retoj. La membronombro restas stabila, kio fakte ne estas tre bona novaĵo kiam oni ambicias pli altajn nivelojn, sed kiu ankaŭ havas siajn pozitivajn flankojn. La financa flanko montras malgrandan deficiton, sed fakte temas pri kontaj ĝustigoj (kiel ni pli detale eksplikos dum la Ĝenerala Kunveno), kaj la rezulto en la realo estas ankaŭ tre stabila.

Tamen, la celoj kiujn la estraro fiksas al si por la pasinta jaro ne sufiĉe plenumiĝis, laŭ nia bilanco. Ni estis certe tre ambiciaj, sed ja ni devas montriĝi tiaj, se ni deziras antaŭenigi nian lingvon. Fakte, mi konfesu ke ni ne kontentas pri la plej grava celo de nia asocio, nome la informa agado en eksteraj medioj. Tio ja ne estas laboro nur de la estraro, sed ni konstatas ke ni ne sukcesis instigi niajn anojn kaj klubojn pli malferme propagandi nian lingvon, kaj ke ankaŭ la iniciatoj kiujn la estraro mem entreprenis ne atingis ĉiujn celojn kiujn ni estus dezirintaj. Tio estas afero pri kiu ni devus debati profunde, kaj ni esperu ke la Kongreso de Cullera montriĝu bona platformo pro tiu kolektiva cerbumado.

Cullera fariĝos bona renkontiĝejo ankaŭ por ĝui la etoson kaj kulturalan enhavon de niaj kongresoj. En la lastaj jaroj ni povas fieri pri la kvalito de la programeroj kaj la amika interrilato, kaj ni certas ke ankaŭ tiu ĉi 74a kongreso kiu nun alproksimiĝas montriĝos je la sama nivelo. Ni do invitas vin ĉiujn kunfesti dum la unuaj tagoj de majo en la tagoj de la hispana esperantistaro. Venu al Cullera!

José Antonio del Barrio

Enhavo

Salutvortoj	1
Asamblea General Ordinaria	3
Cuentas Pérdidas y Ganancias	4
Raporto pri aktivaĵoj en 2014 (Resumo)	6
Agadlinioj por 2015	10
Presupuesto 2015	12
Bitoteko renovigita	13
Dokumentoj alvenintaj al la Biblioteko en 2014	13
Heredado de materialo por nia biblioteko	16
Projekto “Dua Kihoto”	18
74-a Hispana Kongreso de Esperanto	19
Junulara Agado	20
Pri Grupoj kaj Asocioj	21
Vizito de Iván Ertl ĉe HEF	23
Poezia angulo	24
Nova libro de SATeH aŭtorita de Miguel Fernández	25
Novaj kolektoj de libroj el Eŭskio	26
Kronikoj pri Cheste Esperantista	26
Du apartaj poemoj de du apartaj poetoj	28
Dua konkurso pri rakontoj “Los Pinos del Retiro”	30
Lasta novaĵo pri esperanta muziko	32

Sur la kovrilo: Kastelo de Cullera.

La pasintan lundon, 9-an de marto, nia kortuŝa kaj entuziasma amiko Eduardo Larrouy iĝis 102-jara. Li celebris la eventon ĉeestante ĝeneralan kunvenon en la sidejo de la E-Grupo de Bilbao.

Jesús M. García Iturrioz,

Sekretario de la E-Grupo de Bilbao.



La Redaktoro kaj kunlaborantoj de Boletín deziras al li ĉion la plej bona.

ASAMBLEA GENERAL ORDINARIA

El Presidente les invita a asistir a la Asamblea General Ordinaria, que tendrá lugar el domingo 3 de mayo de 2015, a las 9:30 horas (a las 10:00 en segunda convocatoria) en la Casa de Cultura de Cullera (Valencia), calle Pescadors nº 79, con el siguiente orden del día:

- 1.- Lectura y aprobación del acta de la anterior asamblea (4 de mayo de 2014).
- 2.- Renovación parcial de la Junta Directiva.
- 3.- Aprobación de las cuentas y Tesorería del 2014.
- 4.- Aprobación de la Memoria de actividades de 2014.
- 5.- Informe sobre los socios.
- 6.- Aprobación del Plan de Acción para 2015.
- 7.- Aprobación del Presupuesto para 2015.
- 8.- Cuotas para el año 2016.
- 9.- Ruegos y preguntas.

IMPORTANTE: Los miembros de la Federación que deseen ser representados por algún otro socio, por favor que envíen un mensaje comunicándolo, indicando claramente el nombre completo del representante y representado, al buzón electrónico admin@esperanto.es o bien por correo postal a las oficinas de la asociación, antes del 28 de abril.

El Presidente de HEF
José Antonio del Barrio Unquera

ORDINARA ĜENERALA KUNSIDO

La Prezidanto alvokas vin ĉeesti Ordinaran Ĝeneralan Kunsidon, kiu okazos la 3an de majo de 2015 (dimanĉe), je la 9:30 horo (je la 10:00 horo dua alvoko), en la Casa de Cultura de Cullera (Valencio), strato Pescadors n-ro 79, laŭ la jena tagordo:

- 1.- Legado kaj aprobo de la protokolo de la antaŭa kunveno (4a de majo 2014).
- 2.- Parta renovigo de la Estraro.
- 3.- Aprobo de la kontoj kaj kas-stato de 2014.
- 4.- Aprobo de la Raporto pri aktivaĵoj de 2014.
- 5.- Informo pri la anaro.
- 6.- Aprobo de la Agadlinioj 2015.
- 7.- Aprobo de la Buĝeto por 2015.
- 8.- Kotizoj por la jaro 2016.
- 9.- Sugestoj kaj demandoj.

GRAVA RIMARKO: La membroj de HEF, kiuj deziras esti reprezentataj fare de iu alia membro, bonvolu transdoni mesaĝon informante pri tio, klare indikante la kompletan nomon de la reprezentonto kaj de la reprezentoto, al HEFa retpoŝta adreso admin@esperanto.es, aŭ per ordinara poŝto al la oficejo de la asocio, antaŭ la 28a de aprilo.

La Prezidanto de HEF
José Antonio del Barrio Unquera

CUENTA DE PÉRDIDAS Y GANANCIAS

	<u>2014</u>	<u>2013</u>
1. Ingresos Afectos a la Actividad	6.928,37	8.483,99
b) Prestaciones de servicios (<i>Venta de libros, Camisetas, Cursos...</i>)	862,37	779,95
c) Ingresos de Gestión Corriente (<i>Cuotas y Congresos</i>)	6.066,00	7.704,04
4. Aprovisionamientos	-651,82	-574,43
a) Consumo de mercaderías (<i>Libros</i>)	-651,82	-574,43
5. Otros Ingresos de la Actividad	38,00	685,00
b) Subvenciones, Donaciones y Legados	38,00	685,00
7. Otros Gastos de la Actividad	-6.952,18	-7.585,11
a) Servicios Exteriores	-6.952,18	-7.573,86
a2) <i>Reparaciones y Conservación</i>	-	-
a5) <i>Primas de Seguros</i>	-106,72	-102,41
a6) <i>Servicios Bancarios y Similares</i>	-356,71	-454,38
a7) <i>Publicidad, Propaganda y Relaciones Públicas</i>	-4.356,30	-5.458,84
a8) <i>Suministros</i>	-195,24	-125,93
a9) <i>Otros Servicios</i>	-1.937,21	-1.432,30
b) Tributos	-	-11,25
A.1) RESULTADO DE LA ACTIVIDAD	-637,63	1.009,45
14. Ingresos Financieros	-	27,63
b2) De Instrumentos Financieros en Terceros	-	27,63
15. Gastos Financieros	-	-
b2) Por deudas con terceros	-	-
A.2) RESULTADO FINANCIERO	-	27,63
A.3) RESULTADO ANTES DE IMPUESTOS	-637,63	1.037,08
A.4) RESULTADO PROCEDENTE DE OPERACIONES CONTINUADAS	-637,63	1.037,08
A.5) RESULTADO DEL EJERCICIO	-637,63	1.037,08

BALANCE DE SITUACIÓN		
<u>ACTIVO</u>	<u>2014</u>	<u>2013</u>
A) ACTIVO NO CORRIENTE	62.390,91	62.390,91
II. Inmovilizado material	62.390,91	62.390,91
1. Terrenos y construcciones	60.101,21	60.101,21
211. Construcciones	60.101,21	60.101,21
2. Otro inmovilizado material	2.289,70	2.289,70
232. Biblioteca	2.289,70	2.289,70
B) ACTIVO CORRIENTE	38.684,22	39.321,85
II. Existencias	2.535,81	3.121,32
1. Comerciales	2.535,81	3.121,32
300. Libros y material diverso	2.535,81	3.121,32
III. Usuarios y Deudores Varios	517,00	748,43
3. Patrocinadores, Afiliados y Otros Deudores	517,00	748,43
447. Socios	517,00	748,43
V. Inversiones financieras a corto plazo	-	-
5. Otros activos financieros	-	-
566. Depósitos constituidos a corto plazo	-	-
VII. Efectivo y otros activos líquidos equivalentes	35.631,41	35.452,10
1. Tesorería	35.631,41	35.452,10
570. Caja, euros	126,39	97,25
572. Cuenta en UEA	1.486,40	-
572. Bancos e instituciones de crédito c/c vista, euros	34.018,62	35.354,85
TOTAL ACTIVO	101.075,13	101.712,76

PASIVO	2014	2013
A) PATRIMONIO NETO	101.043,13	101.680,76
A1) Fondos propios	101.043,13	101.680,76
I. Capital	101.680,76	100.643,68
101. Fondo Social	101.680,76	100.643,68
VII. Resultado del ejercicio	-637,63	1.037,08
129. Resultado del ejercicio	-637,63	1.037,08
C) PASIVO CORRIENTE	32,00	32,00
V. Acreedores comerciales y otras cuentas a pagar	32,00	32,00
3. Acreedores varios	32,00	32,00
410. Acreedores por prestaciones de servicios	32,00	32,00
TOTAL PATRIMONIO NETO Y PASIVO	101.075,13	101.712,76

RAPORTO PRI AKTIVAĴOJ EN 2014 (RESUMO)

1. INTERNA ADMINISTRADO

1.1. La estraro kunsidis sep fojojn dum 2014.

1.2. Okazis unu ĝenerala kunveno, ordinara, la 4an de majo de 2014, por aprobi kontojn kaj raporton 2013, inter aliaj aferoj.

1.3. Junulara Sekcio: Alejandro Escobedo estis elektita nova Prezidanto de HEJS.

1.4. Agadlinioj 2014: estis la unua jaro uzante tiun novan agadplanon. La agadlinioj detaligas la aktivaĵojn de la asocio dum la jaro kaj permesas taksu la rezultojn por plibonigi la agadon dum venontaj jaroj.

1.5. Oni eldonis kvar numerojn de *Boletín* (405, 406, 407 kaj 408).

1.6. *Bitbulteno* estis sendita ĉiujn monatojn krom aŭgusto.

1.7. Retpaĝo: Parto de la materialo en la paĝo de HEF estis tradukita ankaŭ en la aragonan. Oni inaŭguris februarie servon por la anaro: nova interna spaco en la retpaĝo alirebla pere de pasvorto por konsulti internajn dokumentojn de la asocio

1.8. Biblioteko *Juan Régulo Pérez*: Ĝi daŭre estas alirebla de ĉiuj, tamen nur HEF-anoj rajtas prunt-preni. La katalogo estas disponebla pere de la HEF-retpaĝo. Dum 2014 novaj ekzempleroj estis aldonitaj al la kolekto, ĉefe danke al heredaĵoj de eksaj membroj.

1.9. Bitoteko: Dum 2014 oni aldonis pli da materialo.

1.10. Sociaj retoj: HEF, HEJS kaj kelkaj el ĝiaj anoj havas kontojn en YouTube, Facebook, Twitter, Google+ kaj Tuenti (ĉi lasta nur el HEJS), kiuj estas regule uzataj por disvastigi informojn pri aktivaĵoj kaj pri E-o.

2. INSTRUADO

2.1. Membroj de HEF gvidis kursojn en kelkaj urboj tra la tuta ŝtato.

2.2. Teruel: ekis loka agado de nia samideano Alberto Granados, kiu gvidis kurson en loka asocio, post jaroj de neekzistanta e-aktivo tie.

2.3 En Herrera del Duque (Badajoz) okazis kurso de Esperanto far nia samideano Javier Romero Tello, kiu ankaŭ estis intervjuita en loka ĵurnalo.

2.4. Okaze de la Eŭropa Tago de la Lingvoj, HEF estis invitita de la Oficiala Lingvo-Lernejo de El Burgo de Osma por prelegi. Nia samideano loĝanta en Soria Carlos García reprezentis HEF kaj organizis enkondukan kurseton kaj lotumis du ekzemplerojn de *La Eta Princo* donacitajn de HEF.

2.5. HEF organizis la "1an Konferencon pri la instruado de Esperanto, en Hispanio kaj la mondo", okazintan dum la Hispana Kongreso 2014. Prelegis gravaj fakuloj pri instruado kiel Katalin Kovats kaj okazis sesio de oficialaj ekzamenoj laŭ KER-sistemo.

2.6. Oni refondis instruistan fakon en HEF, kiel ILEI-sekcio en Hispanio. Ĝi estis aprobita kaj akceptita de ILEI mem dum ties konferenco en Montevideo inter la 19a kaj la 25a de julio.

2.7. HEF apogis la Interlingvistikajn Studojn ĉe la Universitato Adam Mickiewicz en Poznań (Pollando), instigante la "Fundación Esperanto"-n helpi hispanajn studentojn. Finfine "Fundación" donis stipendion po 500 eŭroj al Suso Moinhos el Galegio.

3. KONGRESOJ

Organizitaj de HEF aŭ ties aliĝintaj asocioj

3.1. 73a Hispana Kongreso en Arundo (Ronda, Malago), 1a-4a de majo, organizata de AEU kaj la loka klubo. Partoprenis ĉirkaŭ 150 homoj. La programo estis tre bunta kaj elstaris la konferenco pri instruado. Denove okazis la spektaklo "Vivu la teatro" gvidata de Miguel Fernández kaj Ana Manero. Apartaj programeroj estis dediĉita al la movado en Norda Afriko. Oni prezentis tri novajn librojn en Esperanto verkitajn de membroj de HEF: *Poezio, armilo ŝargita per futuro* de Miguel Fernández, *Eŭropo paŝon post paŝo* de Rafaela Urueña kaj *Mediteraneaj eroj II* de Ángel Arquillos.

3.2. 10a IRO en L'Arboç (Katalunio), inter la 5-a kaj la 7a de septembro, organizita de HEJS kune kun KEJ kaj PEJ.

3.3. 22a Internacia Esperanto-Semajno de Kulturo kaj Turismo en Salou (Katalunio), 4a-11a de oktobro.

3.4. Tagojn ĉirkaŭ la 15a de decembro: E-asocioj apartenantaj al HEF festis la Zamenhofan Tagon tra la tuta ŝtato.

Partoprenitaj de membroj de HEF

3.5. Somera Esperanto-Studado en Nitra (Slovakio) inter la 12a kaj la 20a de julio. Instruis membro de HEF.

3.6. 99a Universala Kongreso en Bonaero (Argentino), 26a julio – 2a aŭgusto. HEF muntis budon dum la Movada Foiro por montri niajn aktivadojn. Nia vicprezidanto Ángel Arquillos partoprenis en la kunsidoj de la Komitato de UEA kiel B-Komitatano reprezentante nian asocion.

3.7. 87a SAT-Kongreso en Dinano (Bretonio, Francio), inter la 9a kaj 16a de aŭgusto. Iuj membroj de HEF gvidis programerojn.

4. DISVASTIGO

4.1. Ekspozicioj de Paneloj: 2, unu en Valdemoro (Madrido) ĉe la Publika Biblioteko “Ana María Matute” dum la monato marto, koincide kun kurso tie instruita, la alia en Santoña (Kantabrio) ĉe la urbodomo inter la 20a de marto kaj la 7a de aprilo.

4.2. Tradicia legado de *Don Kihoto* dum la Internacia Tago de la Libro (24an de aprilo) en Madrido (Círculo de Bellas Artes), du HEF-anoj legis kelkajn paragrafojn el la komenco de la dua parto. Ankaŭ ano de HEF legis pecon de la libro en E-o dum la legado en la kultura centro Juan Prado de Valdemoro (Madrido).

4.3. Dum la festado de la Tago de la Libro en la junulargastejo “San Fermín” (kvartalo San Fermín, Madrido) Miguel Fernández prezentis sian libron *Poezio: armilo ŝarĝita per futuro* kaj deklamis poemojn kune kun Matilde Montero kaj en Esperanto kaj en la hispana.

4.4. HEF partoprenis la 2an Foiron de la Socia Ekonomio de Madrido pere de komuna budo kun MEL, inter la 31a majo kaj la 1a de junio en la Kultura Centro “Matadero”. Oni propagandis E-on kaj vendis kelkajn librojn. La sperto estis tre bona kaj indas ripeti la partoprenon venontajn jarojn.

4.5. HEF donacis kelkajn librojn al la Popola Biblioteko “San Fermín”, i.a. *Don Kihoto*, *Curso de Esperanto* de M.Gutiérrez, *Vortaro Amika* kaj *Don Kihoto parolas esperanton*.

4.6. Miguel Fernández partoprenis en literatura evento organizata de la asocio “Los Pinos” de la kvartalo Retiro (Madrido) kaj deklamis poemojn el sia libro *Poezio: armilo ŝarĝita per futuro*.

4.7. Kunmemora agado de la apero de la “Unua Libro” la 26an de julio en Madrido pere de prelego far Dennis Keefe (komitatano de UEA) kaj pere de gazetarkomuniko.

4.8. Omaĝo al profesoro Juan Régulo Pérez: fine de oktobro komenciĝis agado por la centa datreveno de la naskiĝo de la Profesoro. ESTO kunordigis kelkajn aktivajn en Tenerifo: prelegojn, reeldonon de la libro en la hispana *Pri unu adopto kaj unu omaĝo* kaj la ekspozicion “Juan Régulo kaj Esperanto”.

5. AMASMEDIOJ

5.1. Radio Vallecas: daŭra kunlaboro de membro de HEF kun ĉi radiostacio rilate al E-o ĝenerale.

5.2. Antonio Marco Botella estis intervjujita en *El País* la 21an aprilo, parolis ne nur pri E-o, sed ankaŭ pri sia sperto dum la ekzilo post la interna milito en Hispanio.

5.3. Intervjuo en Radiol1 en la programo “Esto me suena-Las tardes del Ciudadano García” al Prezidanto la 30an de aprilo okaze de la HK2014 en Arundo.

5.4. Okaze de la Eŭropa Tago de Lingvoj (26an de septembro), HEF sendis komunikon por la gazetaro. Radio ECO de Leganés (Madrid) intervjuis la Prezidanton J.A. del Barrio.

5.5. Sabate la 8an de novembro, oni elsendis en televida programo pri eduka sistemo de la regiona kanalo *Canal Extremadura*, intervjuon kun nia kolego José María Salguero (*Kani*), pri lia laboro por instruado de Esperanto en la mezlernejo "Cuatro Caminos" de la ekstrema urbo Don Benito.

5.6. La ĵurnalo *Diario de Teruel* aperigis raporton pri Esperanto dum marto kaj bonegan artikolon pri Francisco Azorín Izquierdo la 30an de novembro.

6. ALIAJ AKTIVAĴOJ

6.1. HEF apogis la agadon de la asocio NITOBÉ, kiu defendas la lingvajn rajtojn, por ĝia kampanjo kontraŭ la diskriminacio aplikita de la Eŭropa Komisiono, kiu nejuste favoras la denaskajn parolantojn de la angla. La nova programo Erasmus+ (2014-2020) por la eŭropa junularo, havigis la regularon nur en la angla komence de la jaro 2014, kaj la tradukoj en la aliajn oficialajn lingvojn aperis monatojn post la komenco de la peto de subvencioj.

6.2. La hispanaj aŭtoroj Miguel Gutiérrez Adúriz, Jorge Camacho kaj Miguel Fernández troviĝis inter la 29 selektitaj por antologio de rakontoj tradukitaj en la svedan lingvon. La rakontoj estis originale verkita en Esperanto kaj la antologio titoliĝas *Söka bostad i storstaden (Serĉi loĝejon en la granda urbo)* kaj estis kompilita kaj tradukita de Leif Nordenstorm kaj Sten Johansson.

6.3. La aragona grupo *Frateco* eldonis la libron *Hispana Lirika Antologio*, kiu temas pri vojaĝo tra la poezio verkita en la hispana lingvo, per tradukoj de aŭtoroj de ĉiuj epokoj kaj stiloj. La tradukinto estas Antonio Marco Botella.

6.4. HEF gastigis literaturan vesperon komence de oktobro, kun partopreno de la poeto Nicola Ruggiero, tiam vizitanta Hispanion.

Agadlinioj por 2015

La estraro de Hispana Esperanto-Federacio aprobis agadliniojn por la jaro 2014, kiuj estis ratifitaj de la Ĝenerala Kunveno de la asocio de tiu jaro. La estraro nun konstatis ke nur ĉirkaŭ duono de la agadoj estis plenumitaj, kaj do decidis plilongigi la bazajn celojn por la jaro 2015, kaj adaptis ilin por kovri novajn aktivadojn.

Kelkaj linioj plu rilatas al tiuj nepraj agadoj kiujn ĉiu asocio devas konsideri. Ekzemple:

1. Varbado de novaj membroj: la evoluo de la anaro estis stabila dum 2014, kaj ni konservis la celojn por la jaro 2015
2. Kongreso: post la sukceso de la kongreso de Arundo, la celo ĉijare estas ke HEF apogu la organizantojn de la 74-a Hispana Kongreso en Cullera, ĉefe per varbado kaj diskonigo, kaj ke oni atingu similan partoprenon kiel en la 73-a Kongreso, do almenaŭ 150 ĉeestantoj.
3. *Boletín*: Eldono de kvar numeroj de *Boletín*, kun akurata alveno. Oni studos la eblecon krei version adekvatan por legi en elektronikaj legiloj, kun pli vasta uzo de la elektronika versio pere de la enretigo en la interna spaco.
4. Retejo: Kompletigo de la renovigo de la retejo kaj de la modifo de la aspekto de la Vortaro kaj la Bitoteko. Disvastigo kaj plia uzo de la interna spaco de la retejo. Celo: duobligi nombron de vizitoj kompare kun fino de 2013.
5. Retaj medioj: Intensigi la agadon en la sociaj retoj. Kvankam la nombro de sekvantoj/ŝatantoj notinde kreskis, ni konservas la celon duobligi ĝin kompare kun la fino de 2013. La celon krei almenaŭ unu aplikojn por lertelefonoj pri HEF ne plenumiĝis en 2014, sed ni konservas ĝin por 2015.
6. Biblioteko: la celoj bone plenumiĝis kaj ni intencas sekvi la saman vojon.
7. Bitoteko: Same. Ni deziras daŭrigi la kunlaboron kun aliaj kolegoj por kreskigi la bitotekan kolekton per dokumentoj alvenantaj el aliaj fontoj.
8. Gazetaro: sendi almenaŭ dudek komunikojn aŭ informojn al la gazetaro.
9. Propagando: tiu ĉi punkto estas bedaŭrinde tiu en kiu nia asocio pli malproksimis de siaj celoj dum 2014, kaj ni dezirus tion korekti por 2015. Ni memoru ke ni havis la celon prezenti la ekspozicion de HEF en 15 lokoj en la tuta Hispaniokaj organizi almenaŭ 10 prelegojn en diversaj lokoj de Hispanio, kun prioritato en lernejoj kaj universitatoj. Ni konservas ĝin kaj esperas la kunlaboron de la aliĝintaj asocioj.
10. Informa materialo: ni konservas la celon krei unu broŝuron por junuloj kaj alian pri la reto. Rilate al videoj, kiu bone progresis dum 2014, ni esperas plu flegi la kanalon de Jutubo kaj krei propagandajn videojn en la hispana pri Esperanto.
11. Junularo: ni ne plenumis la celojn en 2014, sed denove ni faros specialan penon en 2015 kun rilato al la plifirmigo de HEJS.

12. Financo: ni konservas la celojn serĉi aliajn vojojn novajn por akirado de rimedoj, ekz. per donacado en la reto. Ni ne bonŝancis pri la petoj de subvencioj, sed ĉijare ni devus repreni la klopodojn.

Aliaj celoj estas pli specifaj de la jaro, kaj prezentas la formon de projektoj, kiujn ni devas organizi per la kunlaboro de la membroj. La projektoj kiujn ni proponas al la membroj de HEF ĉijare estas:

1. Kunordigo de instruado

Post la sukceso de la pasinta jaro, dum kiu oficiale kreĝis la instruista fako de HEF kaj estis agnoskita la hispana sekcio de ILEI, ni celas dum 2015 daŭrigi la klopodojn en tiu kampo.

Inter la ideoj por tiu ĉi jaro, troviĝas la kreado de reto de instruantoj, por kunordigi agadojn en Hispanio, la firmigo de tiu instruista fako, kiel ILEI-filio en Hispanio kaj la redaktado pri dosiero pri la agnosko de la Esperanto-titoloj en oficialaj instancoj kaj universitatoj.

2. Eldonado

En tiu ĉi kampo ne progresis tre malrapide, sed ni konservas la celon krei eldonan fakon de HEF, koncentriĝantan ĉefe pri elektronikaj libroj.

3. Datreveno de *Don Kihoto*

Ni deziras profiti la kvarcentan datrevenon de la publikigo de la dua parto de *Don Kihoto*, por promocii la esperantan version kaj kontakti la oficialajn kulturajn instancojn. Ni deziras krei specifan projekton, kun partopreno en kulturaj agadoj (vidu apartan artikolon) kaj kulmini la eldono de la bitlibra versio de *Don Kihoto*.

4. Aliaj datrevenoj

Profiti la 60-an datrevenon de la deklaro de UNESKO por kontakti la oficialajn instancojn kaj neregistarajn asociojn kun rilato al tiu institucio.

Daŭrigi la celebradon de la centa datreveno de profesoro Juan Régulo Pérez, per ekspozicioj kaj aliaj omaĝoj.

KANDIDATU POR LA VENONTA HISPANA KONGRESO

Dum la ĝenerala kunveno de HEF komence de majo, ni esperas ricevi la kandidatecojn por organizi la 75-an Hispanan Kongreson de Esperanto, en 2016. Tiu ronda nombro meritas rondan Kongreson, sukcesan kaj amasan. Kandidatu por ĝin organizi!

Via urbo kaj via rondo havas ankoraŭ la ŝancon esti elektita por gastigi la feston de la hispana kaj internacia esperantistaro.

Ni atendas viajn proponojn!

PRESUPUESTOS 2015

GASTOS

2. Aprovisionamientos	
(Compra de libros, de material didáctico y variación de existencias)	500,00 €
4. Otros Gastos de la Actividad	
Servidor y Dominios Internet	1.050,00 €
Reparaciones y Mantenimiento	40,00 €
Primas de Seguros	120,00 €
Comisiones Bancarias y Similares	350,00 €
Cuota UEA	180,00 €
Boletín	2.800,00 €
Congresos	250,00 €
Otras Campañas y Publicidad	900,00 €
Suministros (electricidad)	130,00 €
Teléfono	450,00 €
Correo	200,00 €
Comunidad Vecinos	800,00 €
Gastos Varios	150,00 €
TOTAL GASTOS	7.920,00
INGRESOS	
1. Ingresos Afectos a la Actividad	
Prestaciones de Servicios (Venta de libros, cursos...)	1.000,00 €
Cuotas y Congresos	5.920,00 €
5. Otros Ingresos de la Actividad	
Subvenciones y Donaciones	1.000,00 €
TOTAL INGRESOS	7.920,00

Bitoteko renovigita

Ekde komenco de februaro 2015 la Bitoteko de Hispana Esperanto-Federacio (HEF) havas novan fasonon. Temas pri ĝisdatigo de la mastrumprogramo Dspace, kiu strukturigas ĝian datenbankon. Bitoteko, do, migris el versio 1.7 de DSpace al versio 4.2.

Fakte, tiun ĝisdatigon HEF provis fari antaŭ pluraj monatoj, verŝajne tiam kelkaj el vi jam konatiĝis kun la nova bitoteka aspekto. Sed, bedaŭrinde, tiam estiĝis multaj kongru-problemoj inter la vinda servo kaj la nova versio de la programo, tiel ke ĝi malbonege funkciis. La malnova versio, tamen, perfekte funkciis vinda.

Nu, por ŝpari al la leganto teknikajn enuajn detalojn pri la tuta procezo, resume sciu, ke HEF devis provizore reveni al la malnova versio dum oni trovis kontentigan solvon por la bona funkciado de la ĝisdatigita programo, kaj ke tiu solvo estis linuksa servo.

Do, per Linukso HEF mastrumas nun ne nur la Bitotekon, sed ĉiujn aliajn provizatajn retservojn. Cetere, renoviĝis ankaŭ la servila hardvaro, pro kio, ne nur Bitoteko, sed ankaŭ la paĝaro kaj la vortaro iĝis pli rapidaj kaj stabilaj. Krome, la nova servo baldaŭ permesos instali la bibliotekan programon Koha, pli potenca ol la nuna Openbiblio.

Revene al Bitoteko, krom la renovigita pli belan aspekton de la retejo, ĝisdatigo havas la avantaĝon de pli intujaj serĉeblecoj per esploraj rimedoj. Ni invitas vin bitotekumi kaj plezuriĝi! Plia bitoteka plibonigo ŝuldiĝas al Massimo Ripani, kiu rapide kaj efike helpis nin pritrakti per optika signorekna programo pli ol sescent dokumentojn, el la unuaj enbitotekigitaj, kiam HEF ne povis tion fari ĉar tiutempe ni ne havis libroskanilon kun la bezonata programo. HEF elkore dankas Massimon, ĉar lia laboro permesis altigi la kvaliton de la servo. Dankindas ankaŭ Alejandro Escobedo, nuna prezidanto de Hispana Esperanta Junulara Societo, kiu peris la kontakton inter Massimo kaj la bibliotekaj responsuloj.

Ana Manero

Dokumentoj alvenintaj al la biblioteko en 2014

Dum la jaro 2014 eniris la bibliotekan katalogon sekvaj dokumentoj:

Anonima donacinto:

Bildvortaro (DUDEN). FEL, 2012

Beletra almanako (N. 20). Mondial, 2007-

Donacinto: Jorge Camacho

Mann, Thomas. *Lotte en Weimar*. Mondial, 2005.

Goethe, Johann Wolfgang von. *La suferoj de la juna Werther*. B. Faber, 1984.

Madách, Imre. *La tragedio de l' homo*. Corvina, 1965.

Karinthy, Frigyes. *Vojaĝo al Faramido ; Kapilario*. Hungara Esperanto-Asocio, 1980.

Rosbach, Johan Hammond. *Bagatelaro*. Esperantoforlaget, 1951.

Ariŝima, T. *Deklaracio*. Ferdinand Hirt & Sohn, Esperanto-Fako, 1924.

Lanti, E. *Manifesto de la sennaciisto kaj dokumentoj pri sennaciismo*. SAT, 1951.

Berveling, Gerrit. *El tiom da jarcentoj*. VoKo, 1994.

Lanti, E. *Vortoj de kamarado E. Lanti*. Sennacieca Asocio Tutmonda, Eldona Fako Kooperativa, 1971.

i <http://bitoteko.esperanto.es/> iv <http://www.koha.org/>

ii <http://www.dspace.org/> v <http://obiblio.sourceforge.net/>

iii <http://www.linux.com/>

Hašek, Jaroslav. *Ne nur soldato Ŝvejk*. Kava-Pech, 1994.

Petőfi, Sándor. *Johano la Brava*. Hungara Esperanto-Asocio, 1984.

Fučík, Julius. *Riporto skribita en la pendumila maŝo*. Panorama, 1979.

Maimon, N. Z. *La kaŝita vivo de Zamenhof*. Japana Esperanto-Instituto, 1978.

Wüster, Eugen. *Zamenhof-radikaro*. Ferdinand Hirt & Sohn, Esperanto-Fako, 1927.

Gončarov, Anatolo. *Esperanto-identeco*. La Kromkancerkliniko, 2010.

Carlevaro, Tazio. *Ĉu Esperanto postvivos la jaron 2045?*. Dubois, 1999.

Rosbach, Johan Hammond. *Fianĉo de l' sorto*. Dansk Esperanto-Forlag, 1977.

József, Attila. *Urboranda nokto*. Hungara Esperanto-Asocio, 1986.

Steele, Trevor. *Sed nur fragmento*. Fonto, 1987.

Vaha, Blazio. *Adolesko*. Oy Mendoservo Ak, 1987.

Martinson, Harry. *Aniara*. Eldona Societo Esperanto, 1979.

Waringhien, Gaston. *1887 kaj la sekvo...*, Tk - Stafeto, 1980.

Heredia, José María de. *La trofeoj*. Tk - Stafeto, 1977.

Couturat, Louis. *Histoire de la langue universelle*. Georg Olms, 1979.

Zaragoza Ruiz, F. *Perfektiga kurso de Esperanto*. [F. Zaragoza, ca. 1980].

Nomura, Rihej, komp. *Zamenhofa ekzemplaro*. Nagoya Esperanto-Centro, 1989.

La Perdita Generacio. *Ĉiamen plu [K-disko]*. Vinilkosmo, 2013.

Nopremle Kostelec na Hané. *Senprobleme en Esperanto [K-disko]*. Verda Stacio [ktp.], 2014.

Donacinto: *Ángel Arquillos*

Arquillos López, Ángel. *Mediterraneaj eroj*. Andaluzia Esperanto-Unuiĝo, 2012.

Arquillos López, Ángel. *Mediterraneaj eroj II*. Andaluzia Esperanto-Unuiĝo, 2014.

Donacinto: *Miguel Gutiérrez Adúriz*

Vidman, Ĉestmir. *Karesa fantazio de Ĉestmir Vidman*. Petr Dvořák, 2010.

Donacinto: *Vidvino de Vicente Tudela Flores*

Thëvenin, Lucien. *La vana kanto*. Kompreni, 1947.

Grignon de Montfort, Louis-Marie. *La mistero de Maria*. Mariaj Verkoj, 1946.

Lu, Ĝingŝan. *Bela konvolvulo*. Ĉina Esperanto-Ligo, 1964.

Liu, Beĵu. *Fajrolumo en la fronto*. Ŝanhaja Esperantista Ligo, 1951.

Izgur, E. *Je la nomo de l' vivo*. Eldonfako de S.A.T., 1926.

Dickens, Charles. *El la Londona skizlibro*. Muusses, 1938.

Zamenhof, L. L. *La kongresaj paroladoj de D-ro L.L. Zamenhof*. Dua parto. Muusses, 1937.

Glück, Julius. *La jubilea kongreso de Esperanto 1912*. Muusses, 1937.

Glück, Julius. *La ora jubilea kongreso de Esperanto 1937*. Muusses, 1937.

Török, Gyula. *Rozinjo*. Muusses, 1938.

Universala Esperanto-Asocio. Kongreso (27a. 1935. Roma). *Oficiala raportaro*, 1935.

Steiner, Hugo. *Tutmonda adresaro de la esperantistoj. 1950*. H. Steiner, 1950.

Brunulo, komp. *Ni legu. [1a parto]*. Sennacieca Asocio Tutmonda, Eld. Fako Kooperativa, 1930.

Schmidt, K. O. *Legu kaj ridu!* Siegfried Ziegler, 1954.

Kurso elemental de esperanto. Prolet-Esperantista Unio de Iber-Amerikaj Landoj, 1933.

La vivo kaj koncepto de la Societo de Amikoj. The Esperanto Publishing Co., 1935.

Brooke, Anthony. *La revolucia homo en la kosma epoko*. [s.n.], 1961.

Brooke, Anthony. *La estonteco de la homo*. [s.n.], 1963.

Anglada Prior, José. *Gramática, ejercicios y diccionario del Idioma Internacional Auxiliar Esperanto*. 1927.

Bruin, G. P. de. *Gvidilo tra la Esperanto-movado*. Sennacieca Asocio Tutmonda, 1936.

Kojc, Martin. *La lernolibro de la vivo*. Internacia Esperanto-Instituto, 1970.

Elsudo, V. *A.B.C. de sennaciismo*. Sennacieca Asocio Tutmonda, Eldona Fako Kooperativa, 1926.

- Koncilio Vatikana (2a. 1962-1965). *Dogma konstitucio pri la Eklezio*. Internacia Katolika Informejo, 1968.
- Slösser-Bresler, B. M. *Erna*. I.K.U.E., 1960.
- Militrezistantoj en multaj landoj*. Internacio de Militkrontraŭuloj, 1930.
- A todos los universitarios*. Universala Esperanto Asocio, 1960.
- Bennemann, Paul. *Tra la mondo*. Ferdinand Hirt & Sohn, Esperanto-Fako, 1921-1922
- Donacinto:** *Filoj de Severiano Arnaiz*
- Vazov, Ivan. *Vagabondoj*. Bulgara Esperantista Kooperativo, 1949.
- Oppenheim, E. Phillips. *Riĉa kaj sen mono*. The Esperanto Publishing Co, 1935.
- Schmidt, Jos. *La origino de la religio*. Espero Katolika, 1927.
- Bruin, G. P. de. *Gvidilo tra la Esperanto-movado. Suplemento 1936-1948*. Sennacieca Asocio Tutmonda, 1948.
- Fernández Menéndez, Manuel. *La homo sur sia vojo*. La Bona Semisto, 1965.
- Understood anywhere*. British Esperanto-Association, 1933.
- Rusiñol, Santiago. *La patrino*. Pres. Feliu & Susanna, 1908.
- Čapek, Karel. *Skizoj pri Nederlando*. Libroservo F.L.E., 1960.
- Stafeto*. J. Régulo Pérez, 1957.
- Libervola Civila Helpservo Internacia*. Libervola Civila Helpservo Internacia, 1950.
- Lindbom, Tage. *Sveda laborista movado*. Sveda Laborista Esperanto-Asocio, 1947.
- Jacobson, S. A., komp. *Mova movado marŝas*. Svenska Frisksportarförbundet, 1936.
- Pujulà i Vallés, Frederic. *Vocabulario esperanto-español*. F. Granada y C^a, 1910.
- Pruissen, C. A., *Komercaj leteroj*. The Esperanto Publishing Company, 1949.
- Rusiñol, Santiago. *Folioj de la vivo*. Espasa, 1909.
- Hoog, H. A. de, komp. *Esperanta krestomatio*. Nederlanda Centra Komitato Esperantista, 1930.
- Strindberg, August. *Insulo de feliĉuloj*. Ferdinand Hirt & Sohn, 1926.
- Guinart, P. A. *Gramática de la lengua internacional auxiliar esperanto*. Tip. Moderna, 1950.
- Christie, Agatha. *Murdo en la Orienta Ekspreso*. The Esperanto Publishing Co., 1936.
- Zamenhof, L. L. *Ekzercaro de la lingvo internacia Esperanto*. Hachette, 1910.
- Botjov, Ĥristo. *Versaĵoj*. Centra Librejo "Esperanto", 1929.
- La poŝlibreto de la Internacia Asocio de Poŝtmark-Kolektantoj*, 1945.
- Katolika Eklezio. Papo (1939-1958: Pio la 12a). *La preĝo por la Sankta Jaro*. [s.n.], 1948.
- Esperanto, lingvo internacia*. [s.n.], 1903.
- El Verdavalo. I*. Verdavalo-Eldonejo, 1936.
- Hispana jarlibro esperantista (1906-1907)*. Hispana Societo por la Propagando de Esperanto. 1906-1907.
- Donacinto:** *Esperanto-Asocio de Britio*
- Amery, Heather. *Mil unuaj vortoj en Esperanto*. Esperanto-Asocio de Britio, 2004.
- Donacinto:** *Faustino Castaño*
- Giménez, Carlos. *La kapitano Alaristo*. [Bildstrioj]. Adapto de la verko de P. Reverte, traduko hejme produktita de F. Castaño.
- Donacinto:** *Pedro Zurita*
- Ivart, Jacques. *Invito por vojaĝo [K-disko]*. Vinilkosmo, 2008.
- Ivart, Jacques. *Brassens plu [K-disko]*. Vinilkosmo, 2011.
- Kajto. *Duope [K-disko]*. Windrose Music, 2011.
- Donacinto:** *Manolo Parra*
- Meven. *Plu meven [K-disko]*. Esperanto-Bretagne, 2004.

Itala esperantisto, direktoro kaj redaktoro de Disvastigo - Informservo de Itala Esperanto-Federacio.

HEREDADO DE MATERIALO POR NIA BIBLIOTEKO

Dum la lastaj monatoj trafis nian asocion la bedaŭrindaj informoj pri la forpaso de du veteranaj samideanoj, aktivaj esperantistoj dum la 50-aj kaj 60-aj jaroj, multe malpli agantaj en nia medio dum la lastaj jaroj, sed kiuj pruvis sian ligitecon al la esperanta ideo ĝis la fino, kiel montris ilia heredaĵo. Nome, la familioj kontaktis kun HEF, por proponi la transdonon al nia asocio de la materialoj lasitaj post ilia forpaso. Tio okazas ne malofte, kaj ni ĉiam akceptas tre volonte la materialon, ĉar montriĝus tre bedaŭrinde se historiaj dokumentoj, ofte tre valoraj, perdiĝus en la rubaĵoj, ĵetitaj de nezorgemaj familianoj.

La liston de postlasaĵoj vi trovas en apuda artikolo, zorge katalogita de Ana Manero. Oni krome notu ke, aliflanke, kelkfoje la postlasaĵo konsistas el duoblaĵoj, kiujn ni devas resendi aŭ disdoni al interesitoj, pro la malgrandeco de nia sidejo, kaj pri kies destino ni devas starigi kriteriojn. Lokaj kluboj kun sidejoj, kaj interesitoj pri historio povas kontakti kun la HEF-biblioteko por peti materialon, se ili interesiĝas pri ĝi.

Sed mi volas profiti la okazon por komenti mallonge pri ambaŭ niaj samideanoj, ĉar ili ŝajnas al mi bonaj ekzemploj de tiuj ne speciale aktivaj aŭ konataj, sed sen kies subteno nia movado kaj nia asocio ne povas funkci, kaj kiuj meritas la memoron kaj la dankon de la membroj de nia asocio kaj de ĉiuj esperantistoj.

ANTONIO MOYA CASADO

Antonio Moya Casado estis konata inter esperantistoj pro unu tre specifa cirkonstanco, kiu eĥis eĉ ekster nia medio: en marto 1967 li edziĝis kun Vicentita Tudela, filino de la konata aktivulo, verkisto de la plej konata vortaro hispana-esperanta de tiu periodo, Ernesto Tudela Flores, kaj la tuta ceremonio okazis en esperantista etoso. Li estis sufiĉe konata muzikisto, pianisto, komponisto interalie de zarzueloj, orkestrestro, interalie de la orkestro de Kordovo, membro de la Reĝa Akademio de tiu urbo. Cetere, ankaŭ ilia filo, Antonio Moya Tudela, estas muzikisto, orkestrestro de la konservatorio de Madrido.

Li estis aktiva rilate al Esperanto ĉefe fine de la 60-aj jaroj. Li membris en la LKK de la Universala kongreso de 1968 en Madrido, estis respondeculo pri bibliotekoj de Madrida Esperanto-Liceo, ktp. Li kaj lia edzino restis konstantaj membroj de la Liceo, kaj foje akompanis nin en diversaj celebradoj.

Mi mem havis al eblecon viziti ilin en ilia hejmo, kiam jam la sano de Antonio ne bonis. Antonio Moya forpasis fine de 2009 kaj nun Vicentita transdonis al ni tiun materialon, inter kiuj tre interesaj dokumentoj pri la vivo en tiu periodo, fotoj, ktp.



SEVERIANO ARNÁIZ

Komence de 2014 atingis nin la novaĵo pri la forpaso de alia pli veterana samideano, eble la plej aĝa ĝis tiu momento: Severiano Arnáiz mortis 102-jara en Madrido. Lia vivo estas koninda, ĉar reprezenta de tuta generacio kiu travivis tre malfacilajn cirkonstancojn en la Hispanio de la mezaj jaroj de la pasinta jarcento.

Li trapasis la internan militon en la respublikana flanko, kie li fariĝis policisto, profesio kiu estos lia ĉiama vokiĝo, sed kiun li ne povis plenumi. Nome, la reĝimo de Franko ne nur ne agnoskis tiun sperton, sed reprezaliis lin pro tio. Li devis dediĉi sin do al aliaj modestaj profesiaj laboroj, sed tiu sopiro neniam forlasis lin, kaj en siaj lastaj jaroj, jam tre maljuna, li denove alproksimiĝis al la polico kaj fariĝis honora, ĉar jam emerita, polica komisaro. La jaron 2009 li ricevis el la manoj de la tiutempe ministro pri internaj aferoj Pérez Rubalcaba, honorigan oran insignon. Ĝis la lasta momento, eĉ jam sur rulseĝo, li akompanis siajn policistajn kompanojn eĉ okaze de surstrataj protestomanifestacioj por plibonigado de iliaj laboraj kondiĉoj.



Fine de la 40-aj aŭ komence de la 50-aj jaroj li lernis Esperanton, kaj aliĝis al Hispana Esperanta Federacio. Li estis relative aktiva en nia movado, sed ĉefe li disvolvis vastan aktivadon en la privata sfero pere de Esperanto: nome li multe korespondis, kaj inter la materialo postlasita de lia familio troviĝas pluraj dekoj da leteroj senditaj de esperantistoj tutmondaj. Ke al kvartalo pure laborista alvenis leteroj el Japanio, Aŭstralio, Usono, la tuta Eŭropo, certe devis mirigi poŝtistoj, kaj certe ankaŭ la aŭtoritatojn.

Li membris dum multegaj jaroj en SAT, kaj ricevis la laboristajn revuojn kaj literaturon. Li mem verkis por la revuo de SAT *Sennaciulo* du artikolojn tre kritikajn kun la reĝimo, montrante la ekonomiajn malfacilaĵojn suferitajn de la laboristoj kaj la malriĉuloj. Por tio li devis uzi kaŝnomon "Kapikua", kaj ilin vi povas legi en la retejo de SAT-en-Hispanio.

En la 60-aj jaroj, pro la malbonaj personaj kondiĉoj, li devis elmigri al Francio. Tiam li malpliigis sian rilaton al Esperanto. Li revenis poste al Hispanio, sed parto de lia familio restis en Francio, kien li ofte vojaĝis. Nur en la lastaj malmultaj jaroj li devis loĝi en rezidejo, sed li konservis sufiĉan vigecon dum multaj jaroj, li daszure ricevis esperantajn revuojn, kaj foje komuniĝis kun SATeH.

Post lia morto, la filino Segunda, loĝanta en la sudo de Francio, ordigis liajn paperojn kaj kontaktis kun HEF por transdoni la esperantan parton. Ni tre dankas ŝin kaj ŝian fraton pro la bonvolemo.

Toño del Barrio

PROJEKTO "DUA KIĤOTO"

Dum la jaro 2015 oni celebras la 400-an datrevenon de la publikigo de la Dua Parto de la verko "Don Kiĥoto", kiu estos sekvata venontjare de la kunmemoro de la morto de ĝia aŭtoro Miguel Cervantes. Same kiel HEF faris en la jaro 2005 okaze de la datreveno de la Unua Parto, HEF vidas la eblecon profiti je la diversaj tradukoj (kompleta aŭ partaj) al Esperanto de tiu verko, por diskonigi nian lingvon en la kulturaj medioj.

Kelkaj agadoj jam estis plenumitaj en la komenco de la jaro, antaŭ la pretigo de tiu ĉi numero de Boletín. Ekzemple, ĝis la 3-a de majo oni povas viziti en la Nacia Biblioteko de Madrido ekspozicion pri kolektemo kun rilato al Cervantes: "*Coleccionismo cervantino en la BNE: del doctor Thebussem al fondo Sedó*", inter kiuj eroj troviĝas la manuskripto de la unua malneto de la traduko de "La malprudenta scivolulo", fare de Luis Hernández Lahuerta, kun liaj propraj desegnoj, kiun li donacis al la kolektemulo Juan Sedó.



Komence de marto, Hispana Esperanto-Federacio donacis al la Nacia Biblioteko de Hispanio tri historiajn verkojn rilatajn al la verko kaj ĝia aŭtoro: du el la unuaj partaj tradukoj, faritaj de Frederic Pujulá kaj Julio Mangada, kaj unu eseeto eldonita de la Madrida Esperanto-Grupo jam en 1915: "Pri Cervantes kaj lia famkonata verko El Quijote".

Ĉiuj tri verkoj estas troveblaj en nia Bitoteko, al kiu oni ĵus aldonis aliajn pionirajn tekstojn rilatajn al Cervantes, kiel ekzemple la unuan partan tradukon de la verko: «Tri ĉapitroj el la hispana verko de la verko: «Tri ĉapitroj el la hispana verko de la verko».


Mihaelo de Cervantes Saavedra "La sprita junkro Don Kiĥoto de Manĉujo", esperantigitaj de Carlo Bourlet, Vicente Inglada kaj Geo C. Law», eldonitan en 1905.

La cetero de la projekto estas ankoraŭ tute malferma, kaj ni kalkulas je la kunlaboro de la grupoj kaj aktivuloj por ĝin plenumi. Oni proponas daŭrigi la donacadon de la traduko de Don Kiĥoto, farita de Fernando de Diego, al diversaj institucioj, bibliotekoj, universitatoj, ktp. Nunjare oni povas ĝin suplementi per la donacado de la dulingva libro "Donkiĥoto parolas Esperanton", kiun HEF eldonis okaze de la pasinta datreveno, kaj el kiu ankoraŭ restas ekzempleroj kiujn HEF volante metas je la dispono pro tiu ĉi projekto.

Ankaŭ eblas organizi aŭ kunlabori en ekspozicioj, publikaj prezentaĵoj, ktp.

HEF kontaktos kun la aŭtoritatoj organizantaj agadojn por la datreveno por proponi nian kunlaboron, sed estus interesi ke la grupoj kaj aktivuloj mem kontaktu kun la propraj institucioj aŭ kampanjoj.

Toño del Barrio



74-A HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO

Cullera (Valencio) Novaj Perspektivoj

La venonta Hispana kaj Valencia Esperanto-Kongresoj, okazontaj de la 1a ĝis la 3a de majo, jam atingis pli ol 60 partoprenontoj el 5 landoj: Finnlando, Germanio, Sudkoreio, Vjetnamio kaj, kompreneble, Hispanio.

Ni profitas por montri pli definitivan programon:

VENDREDE

- [11:00 – 14:00] Akceptejo
- [11:00 – 14:00] Libroservo
- [11:00 – 13:00] Enkonduka kurso al Esperanto
- [12:00 – 14:00] Subtekstigitaj mallongaj filmoj
- [14:00 – 16:00] Liber-tempo
- [16:00 – *] Ekspozicio de malkovritaj malnovaj poŝt-kartoj
- [17:00 – 18:00] Subtekstigitaj mallongaj filmoj
- [18:00 – 18:30] Malfermo kaj donaco al la municipa biblioteko
- [19:00 – 19:30] Prelego pri temaj portaloj kaj retmerkato
- [19:30 – 20:00] Donkiĥoto kaj Esperanto, tria etapo
- [21:00 – *] Interkona vespero (ludoj, trinkaĵoj...) Memoru porti *pladon el via regiono*



SABATE

- [9:30 – 13:00] Valencia turismo tra Cullera (ĉio senpaga) + Taga astronomio ĉe la kastelo
- [15:00 – 16:00] Ĉu vi kuraĝas esti pli kreema? Ateliero de kreemaj teknikoj
- [16:00 – 16:30] Asembleo de HEJS (hispana junularo)
- [16:00 – 17:00] Partoprenu grupan eksperimenton pri merkato
- [16:30 – 17:00] TEJO: kion vi povas fari por la Esperanto-movado
- [17:00 – 17:30] Kongres-foto
- [17:30 – 18:30] Prelego pri alia Vjetnamio
- [17:30 – 18:30] La retkatalogoj de Biblioteko Juan Régulo: ontaj perspektivoj
- [18:30 – 20:00] E-instruado: agnosko de diplomoj, kiel bone instrui kaj Ligo de Instruistoj
- [20:00 – 22:00] Bankedo: paelo kaj aliaj valencianaĵoj (*pagó*)
- [22:00 – 23:00] Koncerto en Esperanto de Jonny M. Inter la kulturaj programeroj de la Kongreso de Cullera, ni povas jam konfirmi la ĉeeston de la rege-artisto *Jonny M.* Jonny, kiu produktas regean muzikon de la jaro 2006, en 2011 publikigis sian unuan regeon en Esperanto. Ĝi iĝis granda sukceso en Esperantujo kaj tial li faris en 2012 koncertojn tra la tuta mondo, ekzemple Japanio kaj Slovakio. Sekvis en la jaro 2013 esperanta KD "Regestilo", kiu prezentis lian freŝan stilon en longa albumo. Ankaŭ kun tiu albumo li vojaĝis tra la tuta mondo kaj donis koncertojn ekzemple en Brazilo kaj Francio.

DIMANĈE

- [9:00 – 11:00] Asembleo de HEF
- [12:30 – Vespere] Vizito tra la urbo Valencio (*pagó*)

JUNULARA AGADO



Mati Montero el Madrido, ano de MEL kaj instruistino pri Hispana lingvo kaj literaturo en mezlernejo IES Ciudad de Jaén, kvartalo Orca-sur, en Madrido, prelegetis pri e-o en sia laborejo pro invito de iu instruisto pri Filozofio pasintan marton la 6an. Ŝi montris al la lernantoj tradukitajn kaj originalajn librojn, kaj ankaŭ aŭdigis e-muzikon.

KUNVOKO DE ĜENERALA KUNVENO DE HEJS

La membroj de HEF malpli ol 30-jaraj estas kunvokataj al Oficiala Kunveno de la junulara sekcio, Hispana Esperantista Junulara Sekcio (HEJS), kiu okazos dum la 74-a Hispana Kongreso de Esperanto, en Cullera, la 2an de majo 2015 je la 16a horo. La kunveno estos tute malferma al ĉiuj junuloj dezirantaj kunlabori kaj aktivigi.

La proponata tagordo estas:

1. Reorganizado de HEJS kaj nomumo de estraro kaj respondeculoj.
2. Iniciatoj por kreskigo de la membraro.
3. Aprobo de agadoj por la venonta jaro.
4. Sugestoj kaj demandoj.

NOVA BROŝURO PRI ESPERANTO

Kun la titolo “La ŝanĝo nomiĝas Esperanto”, HEJS, la junulara sekcio de la Federacio, ellaboris novan informan broŝuron pri Esperanto, kun ĉefa fokuso en la speciala karaktero de nia lingvo kiel justa kaj praktika solvo de la lingvaj konfliktoj, kaj kiu estis jam disdonita unuafoje en februaro dum foiro pri lingvo-instruado.

La grupoj kaj aktivuloj dezirantaj akiri ekzemplerojn, bv. sin turni al la Federacio.

EL CAMBIO SE LLAMA ESPERANTO

La lengua más lógica
y fácil del mundo.
Y se aprende gratis!

Caés uno con su lengua
y una lengua para todos

Viaja con el esperanto
alejándote en casa de
esperantistas

La Unesco
recomienda
aprenderlo



PRI GRUPOJ KAJ ASOCIOJ

Andaluzio

Granado



La pasintan 14-an de februaro, Carlos Spinola, Ángel Arquillos el Malago, kaj Hans Adriaansen el Nederlando, tiu lasta, hazarde feriiis en Andaluzio, kunvojaĝis al Granado kun la celo renkontiĝi kun la grupo de tiu urbo por vigligi la etoson inter ili dum komuna tagmanĝo en tipa restoracio, kaj sugestii al ili gvidi kurson al novuloj kaj simpaticianoj, ĉar inter ili estas homoj, kiuj povas organizi la grupon kaj ni povas certigi ke la ideo estos fruktodona, ĉar Fernando Nieto, profesoro de la Universitato de Granado estas nova esperantisto, kiu arde pretas kunoragnizi la grupon kaj ni devas profiti la okazon.

Kordovo

Vizitoj de esperantistaj eksterlandanoj en mian urbon (Kordovo) ĉiam estas bonvenaj kaj ne nur pro la fakto, ke mi profitas tiujn horojn por praktiki mian lingvo-konon, sed verŝajne ĉar mia envio-senco pliiĝas, kutime, kiel ĉi-foje, eĉ multobliĝas.

La pasintan 16an de februaro vizitis Kordovon Hans Adriaanse, nederlanda samideano kaj UEA-delegito en la urbo Maastricht. Jes, mi menciis unualinie mian envio-sencon kaj jen la kialo: laŭ Hans diris al mi, li, post sia emeritiĝo, profitas semajnfinojn por preni aviadilon kaj viziti kelkan regionon en Eŭropo, la nordo de Afriko aŭ eĉ Oriento kaj kompreneble la lingvo esperanto faciligas, kaj eĉ ebligas, tiujn vizitojn. Do, li vojaĝis aviadile el Nederlando en Malagon, li vizitis la tieajn gesamideanojn, li ĉeestis unutagan renkontiĝeton de la granadaj samideanoj kaj fine li venis en Kordovon.

Bedaŭrinde en mia urbo mi ne disponas pri E-hotelo, malgraŭ tiu mi rekomendis al li hoteleton ĉe tipa strateto de la historia kvartalo, laŭdire la domo kie loĝis la kordova poeto Luis de Góngora. Pri E-hoteloj necesas diri, ke Hans kaj la grupo de Maastricht disponas pri propra konstruaĵo kie estas eble resti, kontraŭ malalta prezo se vi ne estas esperantisto kaj tute senpage se vi parolas la internacian lingvon.

Nu, mi renkontis kun Hans vespere kaj dum kelkaj horoj mi akompanis al li dum vizito al la urbo: la juda kvartalo, antikva palaco nun universitata fakultato, la ĉirkaŭaĵoj de la Moskeo, la romia ponto, ktp. Laŭ li diris al mi, la urbon Maastricht ankaŭ fondis la romianoj kaj pro tio unu el la pontoj de la urbo estas tre simila al tiu de Kordovo, kuriozaĵo mi pensis, antaŭ multaj jar-

estis eble vojaĝi tra la tuta Eŭropo pere de la latina lingvo kaj en la 21-a jarcento ni uzas alian komunan lingvon.

Mi ĉiam opiniis, ke preskaŭ ĉiuj geesperantistoj similas, eble ekzistas pli da similaĵoj inter esperantisto de (ekzemple) Aŭstralio kaj de Hispanio ol inter homoj de sama lando. Kaj tiu mia teorio denove efektiviĝis okaze de la vizito de Hans. Tiel, la kuriozemo por koni konkretajn detalojn de la kulturo kaj la vivo de urbo, la scivolemo pri kutimoj aŭ la intereso pri vortoj kaj lingvoj aperis multfoje en la konversacio. Komprenoble ankaŭ okazis trinkado de biero, freŝa malgraŭ la malvarma vetero, interkrampe mi diros ke tiu malvarma vetero de pluvema februara tago laŭ mia opinio, fariĝis tute printempa kaj tre agrabla por Hans, ve! Mi ne volas imagi la centr-eŭropajn vintrojn.

Bedaŭrinde mi ne povis akompani lin okaze de vizito al la fama kordova Moskeo. Mi ĉiam ŝatas montri ne-konatajn detalojn al eksterlandaj vizitantoj de tiu universala monumento, sed ĉi-foje ne estis eble ĉar ni alvenis en la pordon de la Moskeo kelkaj minutoj post la fermiĝo. Do, li mem vizitis la Moskeon dum la sekvanta mateno, kvankam tiam mi ne povis akompani lin.

Do, kelkhora renkonto kun alilanda esperantisto estas bonega okazo ne nur por praktiki la internacian lingvon sed ĉefe pro pligrandigi mian amikaron kaj sendube iam, verŝajne kiam mi emeritiĝos kaj, kiel Hans, mi vojaĝos tra la tuta mondo. Tiam, mi kaj mia familio vizitos lian urbon, mi estas tute certa, ke miaj filoj eklaboros en Germanio, do mi devos kutimiĝi al tiuj malvarmaj eŭropaj vintroj. Sed ĝis tiam multaj novaj gesamideanoj, kiuj tiam fariĝos geamikoj, venos en mian urbon. Ha, Hans, kaj ne forgesu, ke Vi promesis viziti Sevilon dum la venonta somero. Tiam ni povos ĝui pliajn bierojn.

José María Rodríguez

Granda Kanario

La Grupo de Esperanto de Granda Kanario, kunsidis lastatempe kun la celo disvastigi Esperanton per bildoj, libroj kaj lumdiskoj, kiujn ili montras sube. Bona ideo por turismaj regionoj de Hispanio.

Tony Sar



NIA PREZIDANTO PRELEGIS EN CAUM

La 17an de marto, la prezidanto de HEF prelegis en la Klubo de Amikoj de Unesko en Madrido (CAUM) pri la temo “Esperanto, nuntempo kaj estonto de la lingvo internacia”. Li estis prezentita de la sekretario de la Klubo, kaj ĉeestis ĉirkaŭ dudeko da homoj, kiuj vigle debatis post la fino de la parolado. La okazo estis la kunmemoro, instigita de UEA de la 60 jaroj de la rezoluzio de Unesko favore al Esperanto en Montevideo. La CAUM estas kultura loko kun granda tradicio en la organizado de politikaj kaj asociaj debatoj, kun kiu la esperantistoj longe kunlaboris en la pasinto, kaj kun kiu ni plu esperas interrilati dum venonta tempo.

La Redakcio

VIZITO DE ISTVÁN ERTL ĈE HEF

Meze de februaro vizitis Madridon dum unu semajno la internacia familio de István Ertl kaj Fabienne Berthelot-Ertl, kaj iliaj tri gefiloj. Ili renkontis plurajn esperantistojn divers-tage, kaj la 17-an István prelegis en la sidejo de Hispana Esperanta Federacio, pri la diversaj hazardaĵoj de sia esperantista vivo. Ĉeestis pli ol 20 madridanoj, kun vigla interparolo. Sur la foto, István kun Jorge Camacho, kiu faris la prezentadon.

La prelego estis registrita kaj spekteblas en la kanalo de HEF en Youtube en la adreso <https://www.youtube.com/watch?v=DSGKrQr-ulc>

Okaze de ĉi vizito, Jorge Camacho verkis belan soneton dediĉita al István Ertl

Al István Ertl

En Luksemburg’, nomadbudapeŝtane
amikojn li akceptas malavare
krom en la zamenhofa kaj hungare
ankaŭ ruse, latine kaj germane.

Libroj, revuoj, artikoloj same
post lia revizio senerare
ekvivas novan vivon, kaj elstare
li verkas, kvazaŭ ŝvarce-kolomane.

Imagu, se li tiel virtuoze
verkus abunde – poezie, proze
(li mem bonvolu fari la elekton).

Sed eble li komponis jam abundon
kaj ĝin forŝovis en tirkestofundon
ĉar li aspiras, simple, la perfektion.

Jorge Camacho



POEZIA ANGULO

Pro eraro en la kompostado de la pasinta Bulteno, ni publikigis la suban poemon de Jorge Camacho kun eraro en la ordo de la du lastaj trioĵoj. Ni petas senkulpigon kaj tie ĉi publikigas la ĝustan version:

Madrido 2

Nicola en Madrido nin vizitas
komence de oktobro plu somera,
kaj ni, kanajloj de la grup' ibera
kun li poeziecon kundividas.

Ni konversadas, drinkas, kantas, ridas
kaj, en groteska horo fru-vespera,
laŭ verko de dramisto plej libera,
Miguel Fernández nin elstare gvidas.

La dramtitolo: *Bohemiaj lumoj*.
La loko: ombraj stratoj de Madrido
en la aŭroro de l' jarcent' dudeka.

Kaj nun, sub same anemiaj lumoj,
ni drivas tra ĉi urbo da sordido,
tumulta kaj fripona kaj senpeka.

Mi ne plendas


Mi ne plendas pri la vivo,
ĉar la vivo al mi donacis
la ŝlosilon de la sort'.

Mi ne plendas pri la mort',
ĉar mi vivas kun trankvilo
kun la sorto kaj la vivo.

Mi ne plendas, kara amiko
kvankam mia febla kor'
batas lante kaj kun timo,
ĉar Di' planis paradizon,
plena je viv' kaj kolor'
kun forest' de malamikoj

Ángel Arquillos

Nova libro de SATeH aŭtorita de Miguel Fernández



La 30an de la pasinta decembro vidis la lumon la tria libro publikigita de SATeH (SAT en Hispanio). Ĝia titolo: *Memorindaj anarkiistoj kaj anarkiisma esperantismo*. Temas pri antologio de verkoj de du hispanaj aŭtoroj: la dudekajarcenta liberecana aktivulino Federica Montseny (1905-1994) kaj la nuntempa doktorino pri historio Dolores Marin (1957).

La tekstojn kompilis kaj tradukis la E-verkisto Miguel Fernández, kiu, paĝo-post-paĝe regalas nin, krom per sia pura, bela kaj brila Esperanto, per nemalhaveblaj notoj kaj komentoj, kiuj pligrandigas la intereson de la libro. En ĝi, unue, post biografio de Federica Montseny, ĝueblas ties paro da elplumajoj *Vivo kaj verko de Anselmo Lorenzo kaj Max Nettlau aŭ la leciono pri modesto*. Due, post biografio de Dolores Marin, aperas ties studo *La proleta internaciismo kaj la planlingvoj*. Fine, legeblas tri *Apendicoj*, ĉiuj tri en traduko de Fernández: fragmento de *Aŭtoritatisma komunismo kaj liberecana komunismo*, de Max Nettlau, kaj du komentitaj tekstoj de kantoj emblemaj ĉe hispanaj liberecanoj.

Kvankam bazita sur tre specifa temo, la libro prezentas galerion de homoj kaj eventoj atentaltiran por plej diverstendecaj scivolemuloj pri la hispana historio kaj pri la rilato inter Esperanto –kaj eĉ Ido– kaj la laborista movado. Ĉi-koncerne, la alporto de Dolores Marin estas vere juvela. Ĉar ŝi tiel science kiel entuziasme lokas nin antaŭ la formiĝo de la unuaj E-grupoj. Antaŭ la 5a Universala Kongreso en Barcelono (kiun Zamenhof mem ĉeestis en 1909). Antaŭ la enradikiĝo de Esperanto en laboristaj medioj, malgraŭ la tiame reganta analfabeteco. Tio ja plej surprizas ŝin, samkiel la fervoro, kun kiu tiuj homoj suferintaj tiom da mankoj sin fordonis, post duraj labortagoj, al lernado de la internacia lingvo, de ties vortaro kaj gramatiko, kaj letere kontaktis alilandajn laboristojn. Poste, per personaj intervjuoj de ŝi faritaj kaj citaĵoj el la organo de la barcelona laborista E-grupo *Paco kaj Amo*, ŝi rekonstruas al ni la vivon de tiu asocio ekzistinta de 1907 ĝis 1939. Ĉi pasiiga laboro estis konsistiga parto de la doktora disertacio de Dolores Marin.

La libro, 156-paĝa kaj 21-centimetra, mendeblas ĉe: libroservo@gmail.com kontraŭ 8 € plus sendokostoj. Grandkvantaj mendoj ricevas 50-procentan rabaton. Ĝi disponeblas ankaŭ en la libro-servoj de UEA kaj SAT-Amikaro.

La Enkonduko de la libro legeblas ĉe: [<http://www.nodo50.org/esperanto/Libroservo/MemorindajAnarkiistoj.htm>]

Libroservo de SATeH

NOVAJ KOLEKTOJ DE LIBROJ EL EŬSKIO



En la lastaj semajnoj aperis pluraj de libroj de infana kaj junulara literatura sub la ŝildo de Eŭska Esperanto-Asocio. Ili estas la unuaj verkoj de la porinfana *Kolekto Lunlumo* kaj pri la porjunula *Kolekto Junularo*. La aŭtoro aŭ tradukisto de la verkoj estas Aitor Arana.

Aitor naskiĝis en Legazpi (Gipusko) en 1963. Li estas unu el la plej fruktodonaj verkistoj el Eŭskio, kiu profesie verkas eŭske. Inter aliaj, li kvarfoje gajnis la premion *Baporea* kaj li ankaŭ ricevis la premion *Liburu Gaztea* dufoje, fare de la legantaro. Li tradukas eŭske, hispane, cigan-kaloe kaj en Esperanto. Al Esperanto li tradukis la verkojn *Memoraĵoj de eŭska bovino* (1999) de Bernardo Atxaga kaj *La portreto de Dorian Gray* (2012) de Oscar Wilde.

La libroj de la kolekto Lunlumo ĵus eldonitaj estas:

- *Klaŭda kaj la rivera sekreto*, de Aitor Arana mem.
- *Kiel korekti instruistinin kaj Mi loĝas en du domoj* de Miren Agur Meabe
- *Usoa venis fluge kaj Sola kaj senvosta* de Patxi Zubizarreta
- *Knabo en Marso* de Iñaki Zubeldia (temas pri la unua porinfana sciencfikcia rakonto en la eŭska lingvo)
- *Ĉapulo la fantomo*, de Mariasun Land.



FAJRA AMO



Aitor Arana

Aitor Arana estas la aŭtoro ankaŭ de la unua romano de la *Kolekto Junularo*, la kortuŝa *Fajra amo*.

KRONIKOJ PRI CHESTE ESPERANTISTA

(Historio de kampano kiu instruis Esperanton en vilaĝo)

I

La unua esperantisto en Cheste

En la vilaĝo de Cheste, provinco de Valencio, ekzistis antaŭ longe juna homo nomata Francisco Máñez Sánchez, naskiĝinta en la jaro 1888, kies metio estis terkulturisto. Li estis tre iluzia kaj laborema homo, kaj en unu el siaj vojaĝoj al Valencio li vizitis kafejon kie li aŭdis pri la ekzisto de internacia tre facila lingvo, per kiu laŭdire, en baldaŭa tempo ĉiuj homoj de la Tero interkompreniĝos.

Tio multe impresis lin kaj li sin promesis, tiel baldaŭ kiel eble, lerni ĝin, do li demandis unu kaj alia fojo pri la temo, ĝis kiam fine li atingis aĉeti "Gramatiko kaj Vortaro de Esperanto" de Vicente Inglada Ors kaj López Villanueva. Aŭtodidakte, li lernis la lingvon, kaj samtempe ol li regis ĝin naskiĝis en sia penso la ideo, kial ne instrui tiun lingvon en Cheste?, kaj li eĉ revis ke la tuta loĝantaro, iam, parolu tiun lingvon Esperanto. Tiu revo fariĝis obsedo en la vivo de tiu junulo 19-jara.

En tiu jaro, 1907, Valencio brulis de entuziasmo pri tiu afero, ĉar la urbo fariĝis sidejo de la *Hispana Societo por la propagando de Esperanto* (HSppE), t.e. la Asocio kiu gvidis la Esperantistan Movadon en la tuta lando. Prezidis ĝin la valenciano Román Ayza, kiu anoncis, ke la nova tutlanda estraro intencis organizi en 1909 la San Universalan Kongreson.

La aktivado de Francisco Máñez:

Plena de entuziasmo, la juna chestano pri kiu ni skribas, komencis propagandi Esperanton, kaj por altiri la atenton de siaj samvilaĝanoj por tiu afero, li skribis leteron al eksterlandaj esperantistoj, rekomdante ilin respondi lin al la adreso de la kafejo kiun li vizitis ĉiutage.

Kaj efektive, la propagando montriĝis efektiva, ĉar liaj amikoj kaj klientoj de la kafejo, konstante tiujn leterojn el malproksime, scivoleme demandis al li pri kio temas, kaj li havis do la okazon klarigi unu kaj alian fojon, Kun granda fervoro, pri la celo de la lingvo, la idealo pri interkompreniĝo universala kiun la lingvo enhavis kiel brila allogo, kaj la espero de la esperantistoj atingi iam per interkompreniĝo daŭran senliman pacon inter la homoj.

Máñez komencis do, gvidi en sia urbo la unuajn Esperanto-kursojn, kaj li tion faris post la peniga tuttaga laboro kiel terkulturisto, tamen, la afero tiom ĝojigis lin, ke li sentis la laciĝon de tiu duobla tasko.

En monato aŭgusto de 1908, la 4a Universala Kongreso okazinta en Dresdno (Germanio) decidis, inter diversaj kandidatoj, elekti la urbon Barcelono por la okazigo de la 5a Universala Kongreso. La bona novaĵo por la Valencianoj estis, ke profitante la okazigon en Valencio de grandioza Regiona Ekspozicio, la loka Esperanta Grupo de

Valencio proponis organizi Postkongreson en sia urbo, propono kiu estis akceptita, Tiuokaze, la Valenciaj geesperantistoj publikigis jenan noton:

"Valencio, la Mediteranea Ateno, deziras ankaŭ esti visitata de la tutmonda esperantistaro. Kaj de la plej alta instanco, la registaro, ĝis la plej modesta civitano, ĉiuj anonime petas al la esperantistoj kongresontaj en Barcelono, veni al Valencio por elpruvi ankoraŭ unu fojon, la amindan kaj gasteman karakteron de la Valencianoj.

La Urbeŝtaro kaj la popolo plenamase, iros akcepti D-ron Zamenhof, kun akompano de siaj gardistoj kaj rajda eskorto.

La Komitato de la Valencia Regiona Ekspozicio, la Muzika Konservatorio, ĉiuj senescepte, akceptos la esperantistajn ekskursantoj-vizitantoj kun malfermitaj brakoj. La urba muzikbando, la Granda Kazino, unuvorte Valencio, plej kore deziras plensuti per regaloj siajn gastojn.

En Valencio, do, la esperantistoj!"

La Postkongresa Komitato.

Tiu evento enorme helpis la propagandon de la juna Francisco Máñez en sia urbeto, Cheste.

(En la venonta "Boletin" oni aperigos la duan ĉapitron pri ĉi tiu grava esperantisto).

Antonio Marco Botella

DU APARTAJ POEMOJ DE DU APARTAJ POETOJ

Kiel sciate, en bona poemo la rimvortoj devas laŭeble disti unuj disde la aliaj morfologie kaj leksike. Nu, ĉi teorio aplikendas al versoj faritaj de bonaj kaj bonegaj poetoj. Sed geniaj povas permesi al si la aŭdacon majstre versi ne nur per proksimigo de la morfologio kaj la leksika agadkampo de la rimvortoj, sed eĉ per ripeto de ili. Tielas la paro da poemoj kaj la paro da poetoj elektitaj ĉi-okaze.

En Venecio, ekzistas ponto, sur kiu, en la noktoj, nudmamaj stratulinoj proponas siajn servojn. Tial, tiu ponto popole konatas kiel “la ponto de la mamoj”. Sub tiu titolo, kaj surbaze de tiu esprimo kaj de ties konsistigaj substantivoj kiel ĉefaj rim-elementoj, la andaluza poeto Rafael Alberti (1902-1999) kreis jenan poemon, aperintan ene de lia kolekto *Romo, danĝero por vojirantoj* (1964 – 1967: 1968):

LA PONTO DE LA MAMOJ

REMEMORATA EN ROMO

Ĉe la ponto de la mamoj,
venecianinoj fonas.
Mamoj ja, ne pomoj, kronas
nian ponton de la mamoj.

Sub la ponto de la mamoj
mi kontempris en akv-ondo
mamojn tremi el la ponto
de la mamoj.

Sur la ponto de la mamoj
ennoktiĝis mamoj vere
kaj foriris malapere
tra la ponto de la mamoj.

Sen la ponto de la mamoj
sonĝis mi pri dolĉa onto:
mi dormadis sur la ponto
de la mamoj.

La madrida bardo José Hierro (1922-2002), pli konata kiel Pepe Hierro, estis poeto tiel granda kiel alirebla, kaj tial tre ŝatata de la popolo. Lia poemaro *Kajeroj de Nov-Jorko* (1998) vere elstaras en la panoramo de la nuntempa hispana poezio. Unu el ĝiaj poemoj ĝuas eksterordinaran merititan famon. Temas pri la soneto *Vivo*, kie la vortoj “ĉio” kaj “nenio”, majstre ripetataj de la poeto, servas al li kiel elementoj ne nur rimaj, sed ankaŭ leksikaj, por plastike bildigi la vivon kiel dialektikan sintezon de tiuj du ekstremaj konceptoj.

La soneto netradukeblas. Antaŭ kelke da jaroj mi alvenis al tiu konkludo. Sed, samtempe, ĝuste tiu evidento efikis sur min sprone kaj instige. Tielas beletremuloj! Fine mi akceptis la defion esperantigi ĝin. Jen la rezulto:

VIVO

Al Paula Romero

Finfine ĉio estis ja nenio,
malgraŭ, ke ĝi iame estis ĉio.
Finfine, post nenio aŭ post ĉio,
mi sciis: ĉio estas nur nenio.

Eĥo de mia “Ĉio!” ‘stas “Nenio!”.
Mia “Neni’!” eĥigas kiel “Ĉio!”.
La neni’, mi nun scias, estis ĉio,
kaj ĉio estis cindro de l’ nenio.

El iama neni’ restas nenio.
(Jen iluzi’, kiun mi kredis ĉio,
kaj kiu, fakte, estis la nenio).

Ne gravas, ke l’ neni’ estis nenio,
ĉar pli nenios ĝi fine de ĉio,
de tiomo da ĉio por nenio.

Sanon kaj poezion!

Miguel Fernández

DUA KONKURSO PRI RAKONTOJ DE “LOS PINOS DE RETIRO”

(Dua prezento)

En la pasinta numero de Boletín, aperis mia esperantigo de la verko, kiu ricevis la unuan premion en la Dua Konkursito pri Rakontoj organizita de la madrida najbar-asocio Los Pinos de Retiro. Ĉi-okaze min honoras prezenti al vi miajn tradukojn de la rakontoj, kiuj ricevis la duan premion kaj la trian. Temas pri du tipoj de prozaĵoj, kiuj vere surprizis nin ĵurianojn. Unu, pro sia bone varpita kaj atento-kapta intrigo; la alia, pro siaj poezieco kaj koncizeco. Jen la respektivaj rakontoj: La pluvombrelo, de Leonor Ruipérez, kaj Interne. Ekstere, de Paloma Garzarán. Mi certas, ke ili igos vin vibradi.

LA PLUVOMBRELO

(Dua premio)

Leonor Ruipérez

Jen ni troviĝas, en varma somervespero, en provinca ĉefurbo proksima al Madrido. Okazis la patrona festo de la urbo, do endis kunpreni la infanojn al la kermeso por ke ili ĝuu la karuselojn. Kuris la jaro 1975 kaj, samkiel la plejmulto el la virinoj de mia generacio, mi ne laboris ekster-hejme. Tiuepoke multaj gepatroj pensis, ke la plej bona, kio povas okazi al la filinoj estas edziniĝi kaj okupiĝi pri sia nova familio. Alfredo laboris en vilaĝo proksima al la urbo, sekve li ne feris tiutage kaj tial ni interkonsentis, ke mi portos la gefilojn kaj li prenos nin lastahore en la vespero por reveni hejmen.

Pablo, kvinjara, kaj Sara, trijara, estis kaptitaj de emocio pro la ideo iri kermesen. Dum mi vestis ilin, ili lude kuris unu post la alia. “Mi volas iri al la karambolaj aŭtetoj!”, diris Pablo, dum Sara volis al la trajneto de la sorĉistino.

En la kermeso, la emocio eĉ pli grandis. Tamen estis multe da bruoj, kaj la polvo, kune kun la varmo, faris la medion neeltenebla.

Post ol ĉiu el la infanoj ĝuis sian elektitan amuzilon, ili prenis la tipan sukernubon kaj eĉ kornoglaciaĵon. Ili komencis montri signojn de laciĝo, se ne paroli pri mi, al kiu la ŝuoj kaŭzis doloron

Subite mi atentis unu el la amuziloj. Ja ĝi povus taŭgi por iom ripozi kaj teni la infanojn distritaj, ĉar ni lokeblis triope. Temis pri centra akso, el kiu eliris pluraj brakoj, ĉe kies ekstremo staris po unu aviadileto. Mi sidiĝis sur la centro kaj metis Pablo'n maldekstre kaj Sara'n dekstre de mi. Post ol la homoj okupis la sidlokojn, la maŝino startis. Mi volis morti, kiam mi malkovris, ke por teni sin la kajuto havas nur unu stangon ĉe la antaŭa parto. La braketoj de la infanoj ne ĝisatingis ĝin, estis tro kurtaj, kaj la miaj nenion plian povis fari, krom alpremi la idojn ĉiam pli kaj pli al mi tiel, ke ni formis unu solan korpon. La aviadiletoj vertikale iris supren kaj malsupren kun granda rapideco. La plej malbona afero okazis ĉiufoje, kiam ili atingis la plejan alton kaj kliniĝis al unu flanko kaj al la alia. La flankaj partoj malaltis por faciligi en- kaj el-iron de la vojaĝantoj. Mi kriis: "Help, help, haltigu, mi petas! Mi volas eliĝi!", sed la muziko pluis kaj pluis, kaj neniu aŭdis min. Mi kredis, ke temas pri la fino, ke mi perdos iun el miaj gefiloj senrimede, en la okazo, se ni ne pereos triope. Malgraŭ ĉio, mi ridetis, kaj ili pensis, ke miaj krioj estas parto de la ludo... Ili amuziĝis.

Finiĝis la vojaĝo. La kruroj tremis, la koro volis eliĝi el la brusto, kaj mi sentis enorman emon plori. Nekonscie mi estis preninta amuzilon por adoltoj.

Fine alvenis mia edzo. Li vidiĝis kontenta... Li estis trovinta pluvombrelon.

EKSTERE. INTERNE.

(Tria premio)

Paloma Garzarán

Kiel ĉiujare, li ne forestis ĉe la festo en la kvartalo Oleandroj. Ĉi-jare, tamen, li travivis ĝin alimaniere. Interne.

Sonis tiu muziko, kiu moligis al li la koron. Li sidigis sian animon sur la tabureton de trinkejo.

Pluvis. Ekstere. Interne.

Li adiaŭis etapon de sia vivo, dum li trinkis etajn sorbojn da blanka vino. Friska. Ekstere. Varma. Interne.

Li decidis antaŭeniri, retiriĝi de oficoj, preteri amatajn ĉevaletojn. Ĝojo. Ekstere. Vertiĝo. Interne.

Li atendadis ŝin. Ĝoj-lumo antaŭis al la virino, kiu eniris tra la pordo. Ŝia rideto ŝanĝadis ies vivon.


Li amis ŝin. Ekstere. En la vespero de sia vivo. Interne.

Li eltrinkis sian glason. Adiaŭis tiel aliajn brakumojn, aliajn lumojn, aliajn kisojn. Konsciiĝis prie.

Kisis ŝin. Ekstere. Interne.

Miguel Fernández

LASTA-HORA NOVAĴO PRI ESPERANTA MUZIKO



Aŭskulti la voĉojn de Damjanov kaj Rabu, estas tre reala “Emocio”. Mi spertis tion antaŭ kelkaj tagoj kaj por tio mi faras pozitivan recenzon pri ĉi muzika trezoro.

Veselin Damjanov estis solisto en la profesia bulgara arma ĥoro kie li servis kiel soldato kaj li turneis tra multaj landoj, inkluzivite de Ĉinio. Pli poste, kiam li lasis la armeon li kantis por la Ŝtata Muzika Teatro al kiu li restis fidela dum pli ol tridek jaroj. La bulgara ŝtato esprimis respekton al lia talento kaj artista sindediĉo, aljuĝante al li la titolon “Honora Artisto” kaj la ordenon de “Kirilo kaj Metodio”. Li instruis

kantadon en la Bulgara Ŝtata Konservatorio kaj li estis solisto de la Operaio en Liono, Francio. Li estis invitita por koncerti dum la 59-a UK en Hamburgo.

Ekde tiam li estis la plej ŝatata artisto ĉe esperantaj renkontiĝoj. Lia lingva talento ebligis al li majstri esperanton en mallonga tempo, kaj poste fariĝi elstara tradukisto de kantoj kaj arioj.

Veselin verkis kaj komponis kelkajn kantojn, kiujn li intencis dediĉi al la centjara jubileo de Esperanto en 1987. Sed bedaŭrinde, lia bravuro kaj lia admirinda voĉo neniam plu aplaŭdigos la esperantan publikon post lia forpaso en 1986

Joële Rabu

Naskiĝis en Winnipeg kaj kreskis en Courtenah sur insulo de Vankuvero.

Ŝi apartenas al tiuj nemultaj favoritoj de naturo kiuj ricevas perfektan voĉon dote. Ŝi neniam ricevis kantelecionon.

Dum la lastaj tri jaroj ŝi ĉefrolis en kvar muzikaloj, registris kodiskojn, koncertis en kelkaj kanadaj provincoj kaj usonaj ŝtatoj, aperis en televid- kaj radio-programoj... kaj esperantiĝis.



<http://www.vinilkosmo-mp3.com/eo/lirika-hhoroj.html>

<http://vinilkosmo-mp3.com/eo/kanzono-tradicia-progresiva/jo%C3%ABlle-rabu.html>



HISPANA KAJ VALENCIA KONGRESOJ DE ESPERANTO

CULLERA (Valencio), de la 1-a ĝis la 3-a de majo de 2015

ALIĜILO

Plenumu tiun ĉi aliĝilon, kaj sendu ĝin al la sidejo de HEF. Oni ankaŭ povas uzi la retadreson info@esperantoval.org, aŭ la formularon troveblan en la retejo <http://esperantoval.org/cullera2015/es/inscripcion/>

PERSONA NOMO FAMILIA(J) NOMO(J).....
 ADRESO:
URBO.....(.....)
 REGNO.....RETADRESO..... TELEFONNUMERO(J).....
 MEMBRO DE HEF Jes Ne NASKIĜDATO (nedevige, nur por statistiko aŭ rabato)
 ALIAJ RABATOJ..... DATO DE PAGO..... MANIERO DE PAGO.....
 KOTIZO.....ALIAJ.....
 DONACO.....
 SUMO.....
 KOMENTOJ:

KOTIZOJ

	Aliĝo ĝis la 31-a de januaro ⁽¹⁾	Inter la 1-a de februaro kaj la 15-a de aprilo ⁽¹⁾	Post la 16-a de aprilo kaj surloka aliĝo
Membro de aranĝanta asocio (HEF, HEJS, VEA, VEG)	35€	45€	55€
Nemembro de aranĝanta asocio	45€	55€	65€
Juna membro (malpli ol 30)	19€	29€	39€
Junulo nemembranta (malpli ol 30)	25€	35€	45€

La aliĝo estas senpaga en la jenaj kazoj:
 Naskiĝintaj post del 31/12/1989.
 Nepra akompananto de handikapulo.
 Gravaj kunlaborantoj de la kongreso (unue inserkonsenti).
 Aliaj homoj kiuj deziras partopreni sed vere ne povas (kontakti).

Kiel pagi?

Enkontigo:

Konto: 1491 0001 26 2074618022 (de Hispanio)
 IBAN: ES21 1491 0001 2620 7461 8022 (pago ekster Hispanio)
 Banko: Triodos Bank
 Nomo: Vicente Faulí Amaro
 Urbo: Valencia
 Kialo: Kongreso + tu nombre y apellidos La aliĝo efektiviĝos la pag-tagon. Se eble, sendu al ni atestilon montrante vian pagon, al info@esperantoval.org. Tel: 630493584